

Asocia sidejo de S.A.T. kaj administrejo: 67 avenue Gambetta, Paris 20.

Redaktoroj K. do L. Bannier, ĉe SAT, Parizo kaj Bas Wels 1a Wandeloorddwarsstraat 33, Rotterdam.

Eldonejo de SENNACIULO: C. van Essen, Floretstraat 10, ROTTERDAM, Z.

La Germanaj kontraŭ-Faŝistoj.

Laŭ artikolo de Fritz Küster.

Fritz Küster, prezidanto de la „Deutsche Friedesgesellschaft“ estis redaktoro de „Das Andere Deutschland“ (La alia Germanio), la gazeto en kiu Carl v. Ossietzky — murdita en koncentrejo — heroe batalis kontraŭ la faŝismo. Ankaŭ Küster suferis dum multaj jaroj en koncentrejoj k mal-liberejoj. Red.)

La batalo por alia Germanio estas multe pli malfacila ol en 1918. Tiam la revenantaj soldatoj estis ne nur militlaciaj, sed ili sentis sin trompitaj k estis pretaj aŭskulti la novajn gvidantojn. Por la socialisma k kontraŭ-militisma propagando malfermiĝis novaj esperigaj perspektivoj.

En 1945 ĉio estas alia. La viroj ĝis la aĝo de 60 jaroj restis en la armeoj aŭ faris devigitan laboron ie malproksime de la hejmo. Krom tio la influo de la nazia ideologio estis multe pli efika ol de la germana naciismo dum la antaŭa milito. Ĝis la lasta momento, ĉio troviĝis sub la kalkanumo de la gesta. La soldatoj k la civila popolo, trapenetritaj de dekdujara Gubbels-propagando komence perdis sian kritikemon k poste fariĝis tute apatiaj; oni ne plu kapablis kredi al nova ideo.

Ĉie ni, kontraŭ-faŝistoj k batalantoj de la enlanda fronto, salutis la aliancajn soldatojn kiel liberigantojn k samliganojn. Kun ili ni esperis daŭrigi nian batalon sur la enlanda fronto. Ni spertis seniluziigon. Baldaŭ montriĝis, ke oni batalis kontraŭ Germanio, ke ni ne estas samliganoj, sed... Germanoj. Oni ne faris diferencon inter nazioj k kontraŭnazioj.

Ĉe la publika opinio en la aliancaj landoj estiĝis elreviĝo pri la fakto, ke oni tiom malmulte aŭdis pri kontraŭ-naziaj movadoj en Germanio mem. La klarigo povas esti simpla: ni, kiuj donis nian vivon en la batalo kontraŭ la prusa spirito k la naciismo, ni, kiuj pasigis dek, dekdu, dekkvar jarojn en la koncentrejoj, ricevas nenian okazon por paroli. Al ni ne eblas publikigi iun ajn artikolon aŭ broŝuron.

Suprajaj observantoj opinias, ke sufiĉas likvidi la hitlerajn organizojn k maldungi la naziojn el la ŝtataj k aliaj oficialaj instancoj. Ili kredas, ke sufiĉas malpermesi

ĉian politikan aktivecon en naciisocialisma direkto dum la okupada periodo. Sed kiu tion kredas, malbone konas la mentalecon de la germana popolo. La naciisocialismo estas nur iu plej ekstrema formo de l' germana naciismo. Tial ne sufiĉas ekstermi la naciisocialismon; tio, kio devas esti ekstermata, estas la prusa naciismo, „la spirito de Potsdam“. Estis la industriuloj, la bankieroj k la grandbienuloj, kiuj subtenis Hitleron por frakasi la germanajn socialistojn k pacifistojn, tiel kreante por siaj planoj k interesoj deziratan sferon.

Koncerne tion la Aliancoj montras mankon de respondeckonscio. La militistaj registaroj okupas sin nur k apenaŭ pri nazioj; la kunlaboron de la kontraŭnazioj ili sisteme malakceptas ĉe tiu laboro. La rezulto de tio estas, ke la nazi-satelitoj estas neĝenataj, k se ili havas la bonŝancon posedi judan praavon, oni donas al ili bonan postenon anstataŭ la ĉelon, kiun ili meritas. Tiel ili havas la eblon savi la venkitan militismon tra kaŝita porteto. Pri la fiasko de la militisma plano regi la mondon, la Germanoj kulpigas nun ekskluzive la lastan parton de la firmo Hindenburg-Hitler, nome la Hitlerismon. K tiel oni vidas hodiaŭ en preskaŭ ĉiuj oficialaj ĉambroj sub kontrolo de la Aliancoj, la bildon de l' maljuna Hindenburg, kiu kontente rigardas de sur la muroj. Se tio restas, la danĝero ekzistas, ke nova naciismo venkos en la signo de Hindenburg.

Kion oni ĝis nun atingis en la batalo kontraŭ la Hitlerismo de post la fino de l' milito? Nur en la usona regiono oni severe operaciis. Sed en la brita regiono la plimulto el la nazioj ankoraŭ okupas siajn postenojn. La militistaj regantoj defendas sin per la deklaro, ke antaŭ ĉio la germana popolo devas esti helpata tra la vintro. „Se ni maldungas la naziojn, la afero haosiĝos“. Sed en la distrikto Hannover, kie ĉiuj oficistoj de la nutraĵa distribuado estis eksigitaj, la afero bone marŝas per novuloj. Ofte ni havas la impreson, ke la Angloj opinias, ke ilia tasko estas kontraŭstari nian fortan agadon k protekti la naciisocialistojn.

Sendube: oni povas respekti la motivojn de la Angloj koncerne ilian sinte-

non kontraŭ la popolo. Sed ni timas, ke tiu sinteno, kondukos nin al pli granda mizero.

Cetere ni povas kompreni la stapanĉon de la anglaj oficiroj. Ni, socialistoj k radikalaj pacifistoj, estas multe tro aktivaj laŭ ili. Niaj postuloj kaŭzas maltrankvilon k ili deziras antaŭ ĉio trankvilon. Por informoj la Angloj direktas sin precipe al la eksnaziigita klerikaro aŭ al anoj de la meza klaso. Estas vere, ke la granda amaso kun sia grega instinkto ne meritas fidon, tial ke ĝi en nenio kontraŭis la agadon de l' naciisocialismo. Sed estas ankaŭ vere, ke la decidema malplimulto tenis sin firme ĝis la lasta momento. La plenplenaj de Germanoj malliberejoj k koncentrejoj konfirmas tiun aserton. Ni nun pretas liveri nian kontingenton en la materia ŝuldo, pezanta sur la germana popolo. Sed morale ni ne sentas nin respondecaj. Male: ni postulas la moralan rajton agadi por tiu popolo!

Resume: La Hitlera milito lasis al ni, batalantoj por la paco, malagrablegan heredajon. Nova komenco estas dolora k malfacila. Tio estas afero nia. Sed vi, en la aliancaj landoj devas helpi nin forskui de ni tiujn nenecesajn katenojn. Ĉiun tagon, en kiu ni estas ĝenataj malfaldi nian aktivecon, la ŝanco pligrandiĝas, ke la sub la rubo kaŝitaj fajreroj de l' naciisocialismo, poste kaŭzos novan brulegon.

„SENNACIULO“.

Tiuj, kiuj enamiĝis en la malnovan nomon de nia gazeto, sendube estas tre ĝojaj, ke revenis la titolo „SENNACIULO“. Sed oni ne faru al si la iluzion, ke ni nun havas permeson eldoni la organon k ke ni do ricevas paperon per la oficialaj instancoj. Bedaŭrinde tiel ne estas. Estas ankoraŭ nia presisto, kiu helpas nin k cetere la supre nomitaj instancoj ne estas plu severaj. Tamen la situacio ne estas agrabla k... sufiĉe multekosta. Niaj membroj ne forgesu, ke ni bezonas multe da mono, ankaŭ pro tio, ke el diversaj landoj al kiuj ni sendadas la organon, venas neniom da mono pro la nenormalaj cirkonstancoj. Helpu nin malavare, amikoj!

Malgraŭ la cirkonstancoj, spite al la malfaciloj ĉiaspecaj, nia movado kreskas ĉie. El Germanio niaj amikoj — krom tiuj, kiujn forblovis por ĉiam la nazismo k la milito, — multe skribas, k demandas kiel „fartas” SAT! Ĉar la poŝto akceptas por Germanio nur familian korespondanĵon, nur en germana, angla, franca, rusa lingvoj, ni do devas sekvi vojon ne tre ortodoksan, por transigi niajn leterojn k gazetojn. Granda entuziasmo en Stutgart, Frankfurt, Duseldorf, Frejburg, Munĥen, Eslingen, k.a. urboj. Kvazaŭ enŝlositaj en la nacia kaĝo de post jardeko, ili nun avide sopiras kontakti kun la ... ekstera mondo. Eĉ gravuloj de la iama neŭtrala esperantistaro nun interesiĝas pri nia afero; la diktatura reĝimo, la milito k ties nunaj konsekvencoj estis por ili realaj k teruraj instruoj, kiuj ŝancelas ilian rutinan opinion pri la anakronisma faktoro „nacio”; iom post iom ili agnoskas la erarecon de sia iama kredo.

En Bulgario bona rikoltado ankaŭ; vigla inklino SATaniĝi ĉe multaj. Tie ni havas kolektivetojn de kuraĝuloj ...

Nia peranto en Ĉekoslovakio esperas multon el la tiea propagando por SAT. Jam pluraj dekoj da Kdoj kotizis.

El Aŭstrio bonaŭguraj leteroj, aparte el Vieno, kie la esperantistoj eksterordinare aktivis. Ŝajnas ke la varbado ekiĝos tuj kiam ni havos difinitan peranton.

Kun Polio k Hungario ni interŝanĝas leterojn nur tre malofte, pro la malreguleco de la poŝta servo.

Tre embarasataj ni estas por fiksi la kotizon en tiuj ses landoj; ni ja ne konas la aĉetpovon de la meza salajro de laboristo. Krome absolute neeblos dumlonge eksporti la kolektitan monon, kies valoro reduktiĝas konstante. Sed tio ne estas motivo por ĉesigi nian agadon; ni daŭre liveros la gazeton al ĉiuj, k por kompenci tiun malprofiton en nia kaso, ni vokos al la solidaremo de la SATanoj en la landoj kies mono estas pli stabila.

Grava progresado en Portugalio, dank' al nia diligenta k ordema peranto; fondiĝis portugalia SAT-rondo, kun bulteno titolita „SAT-ido”; 50 anoj. Sama konstato en Norvegio, sama gratulo al la tiea peranto.

En Usono, en Argentino, Belgio, Aŭstralio, Sud-Afriko, novaj adeptoj. Ni aŭdos baldaŭ pri sukceso en Brazilio.

Pri Britio, Danio, Francio, Nederlando, Svedio, ni diru nur jenon: en siaj ĵusaj Kongresoj, tiuj LEAoj konfirmis sian plenan favoron por SAT; ili estas la fandujoj, el kie fontas la ... SAT-anoj. En Nederlando ni ĵus enregistris la milan membron; en Francio la kvanto duobliĝis kompare al 1939; en Svedio: 100 membroj. Resume: ĉie floras nia movado!

Ni retrovis(?) en Stokholm, ĉe S.L.E.A., stokon de SAT-libroj, relative gravan; inter ili estas kelkaj, kiujn ni kredis definitive elĉerpitaj! Ni klopodas por venigi parton al Parizo.

Pri la *Ofset-reeldomo de la Plena Vortaro* ni scias nenion novan, pro la malrapideco eĉ necerteco de la poŝta servo kun

Ĉu estas permesate esperi?

Ni jam longe kutimiĝis al tio, ke oni primokas niajn ideojn, k eĉ esperantistoj ne volas kompreni la mirindan povon entenatan en la ilo, kiun ili alproprigis al si per lernado. Tial nin tiom pli surprizas, se ni trovas inter la voĉkoncerto iujn sonojn eĉ el eminentulaj buŝoj, kiuj apogas nian vidpunkton klare k neduble. K tiuj eĉ ne estas esperantistoj.

Unu estas la nuntempa brita ministro por eksteraj aferoj, kiu diris ĉe la fondkunveno de l'UNO (mi citas laŭ la citaĵo de Merkator en artikolo: „E. Bevin, lia vojo k lia celo”):

„Mi nun volas deklari mian politikan celon: Mi deziras havi la povon iri al la Viktoria stacio k aĉeti bileton kien ajn mi volas, k veturi tien, sen ke iu min tiros ĉe la maniko k volus vidi mian pasporton ... La scienco hodiaŭ tiom progresis, ke limoj fariĝis malspritaĵo ...”

Ankoraŭ pli draste k precize esprimas sin N. Cousins, en „La Sabata Literatura Revuo” (Novjorko). Konstatinte per rezonado, ke nova milito definitive detruos la homaron, li skribas:

„...La homo estas ja preta plene mobilizi siajn teknikajn k intelektajn energiojn por celo de mortigado, sed li ne emas efektiviĝi similan mobilizon por celoj de l'vivo ... Li (la homo) devos ekkoni, ke nacia suvereneco en la atom-epoko estas la plej malbona atavismo. Jam en la malantaŭ ni restinta epoko de l'V-pafaĵoj, antaŭ la 6a de aŭgusto 1945, nelimigita nacia suvereneco estis nenormala k sensenca postrestaĵo de l' gent-instinkto ĉe la popoloj. Se ĝi tiutempe estis sensenca, tiam hodiaŭ ĝi estas la kulmino de l'absurdo. La mondo estas geografia unuo ...”

Finfine do iuj komprenis k kuraĝas eldiri, ke la adoro al la naciaj idoloj iĝis absurdaĵo. Malgraŭ ke tio kontraŭas rektlinie la interesojn de la dividanta k pro tio regadon konservanta kapitalismo! (aŭ ĉu eble hodiaŭ la kapitalismo povas rezigni pri la disŝiriteco en naciojn?)

Ĉiokaze, jen klara mortkondamno por tiuj multkoloraj tukoj, tiuj fieraj naciaj standardoj, kiuj simbolicas la popolajn egoismojn k kiuj sub la blovo de l'nova vento lasas pendi malviglaj siajn diafanaĵojn, kvazaŭ antaŭdiluviĝantaj aperaĵoj hontantaj pro sia nelaŭtepeco. Sed, dum la racio predikas la unuecon de l'terglobe ankoraŭ la sono de fremda lingvo el ies buŝo vekas suspekton k malfidon ĉe la aŭdantoj... Kaj, kio ŝajnas al ni plej nekredbla, estas la fakto, ke eĉ esperantistoj posedantaj la ŝlosilon al unueco, lernintaj mondlingvon, sciantaj manipuli ĝin, cedas antaŭ la naciaj idoloj kiel antaŭ nevenkeblaj diaĵoj, k deklaras „tabu” sian karan gepatran idiomon. Anstataŭ klare k konsekvence ekkoni, ke kun la forĵeto de malnovaj ekonomiaj barieroj (ĉar sole mondskala ekonomiaranĝo povas savi la homaron) oni devas forĵeti ankaŭ la balaston de multnacieco k multlingveco. Ke esperanto ne devos funkcii kiel *helpa* lingvo, sed devos fariĝi la unua, la ĉefa k denaska lingvo de la estontaj generacioj. Por tiu celo ni batalas kiel SAT-anoj. La supraj aŭtoritataj diroj povas nur plifortigi nian pozicion.

— N. Bartelmes —

Meksikio. Tamen, ni esperas ke ni disponos la libron baldaŭ.

Tre verŝajne ĝis fino de junio ni estos ekspedita ĉiujn membrokartojn, — almenaŭ al la landoj por kiuj la poŝto akceptas tian sendaĵon. Ni ripetas: kiam ni ĝin konas aŭ retrovas, ni donas la antaŭmilitan matrikulon al la realiĝantoj, sed estus plejbone ke ĉiu citu ĝin.

Pri la *venonta SAT-Kongreso*: ĝin organizi en 1946 ne eblas malgraŭ nia deziro! Niaj amikoj en Pilsen, Ĉekoslovakio, invitas nin jam por 1948. Kie do ni kongresos en 1947? Kiu kolektivo pretas aranĝi nian 20-an?

Ni devas mencii la restariĝon de instancoj, unu interne de SAT, la aliaj apud SAT:

a) en nia sino de LEA-Komitato, kreita

SONĜO K REALECO.

..... Kiel mi tien atingis, mi ne memoras, sed subite mi staris en hela, klara, forta suna lumo. Ĉirkaŭe nur floroj, belaj milkoloraj. Odoro ŝvebis tiom aroma, tiom delikata, kian mi neniam antaŭe sentis. Trilis birdetoj en plej diversaj gamoj. Antaŭ mi kuris vojo, longa vojo, sur kiu mi staris. Neniam antaŭe mi sentis min tiom feliĉa k facila, tiom malpeza. Estis kvazaŭ mi fluge dancis antaŭen; ĉe ĉiu paŝo mi iom leviĝis super la tero. Mi eĉ ne piediris, mi ŝvebis. ... Plej strange ... mi ne miris; ĉio ŝajnis tute natura. Ĉie regis kvieto, kontento, ĝojo k amo. Pri ĉi lasta mi eksciis, nur veninte inter la homojn. Iliaj domoj estis vastaj, grandfenestraj, puraj. La stratoj aŭ pli ĝuste aleoj estis larĝaj k glataj. La laborejoj preskaŭ ne rimarkeblaj; ili tute ne similis polvajn malliberejojn. En ili ne estis gardestarantoj estroj; fakte nur estroj estis tie, ĉar la maŝinoj funkciis propramove. La moveblaj tegmentoj estis malfermitaj. Lumo gajigis la internon. La laboristoj estis kontentaj, ĉar inter ili ne ekzistis ambicio, disputo, malamo. Primateriajn zorgojn ili ne havis. Ankaŭ lernejojn ni vizitis. Sed kiom mi domaĝis mian propran lernejaĝon. Gvidis la lernantaron ne lignaj mienuloj, ne sceptris la punrimeno. Liberaj, la infanoj aŭskultis la afablan voĉon de l'instruisto, kiu edukis ilin ne pro sia ĉiutaga pano, sed pro sia talento, pro sia amo al la laboro: instruvi infanojn. Mi vidis tie geknabojn el ĉiuj aĝoj, de etuloj ĝis preskaŭ plenkreskuloj. Ĉiu lernis laŭ siaj kapablo k ŝato ĝis posedo de l'tuta scio pri la koncerna fako.

En mia vojaĝo tra la lando mi renkontis ankaŭ gemaljunulojn, sed neniun el ili mi vidis laboranta. Ĉiu pasigis siajn aŭtunajn jarojn en senzorga ripozo, tamen libera por ĉia ajn okupo. Grandaj publikaj parkoj ornamis la urbojn. Troviĝis bele konstruitaj sportejoj, kie sunbrunigita junularo ekzercis sin en plej diversaj ludoj. Strange, la registaro havigis tion al ĝi ne por poste ekspluati tiujn belajn korpojn por siaj buĉejoj. Ne por ekstermi sian samspecon tiuj bele proporciaj korpetoj fortikiĝas. Ho ne! Pri tio ili ne havas komprenon, sed ili zorgis pri la korpo, ĉar ĝi estas unu el la plej karaj naturdotoj, nur en sana korpo bonfarta spirito, kiu ja estas la plej altvalora donaco. Tion ili bone sciis k tial ne kaŭzis doloron al si reciproke. Regis amo inter la homoj, ĉar ili komprenis, ke nur per ĝi povas evolui la spirito. Ĉiu radiis pro ĝi. Ĝia forto infektis ĉiun. La plej granda ordono estis reciproka helpo. Ĝi ne estis dekretita sur papero, sed gravurita en ĉies koro, Oni eĉ ne parolis pri tio, oni opiniis, ke aliel/ne eblas.

Ho, kiom feliĉa mi sentis min inter la homoj, kiom lumē estis; kio pure, kiom kviete! Mi ŝvebis plu, tra kamparo k erikejo, sur ebenaĵo k montoj, lagoj k arbaroj. Ĉie mi renkontis la saman aferon. Malriĉo ne ekzistis! Malbono ne vivis! Ĉie kviete, ĉie regis kontento, ĉie lumis suno. Paco k Amo la grandaj leĝoj de l'kosmo estis la fundamento, sur kiu solaj povas konstruiĝi homa prospero.

..... Subite ... mi ekkonsciis k rigardis ĉirkaŭen. Mi troviĝis en la malpura ĉambro. Ekstere falas senĉesa pluvo. Obtuze penetras mian aŭdono la kanonoj de la fronto. La alarmiloj anoncas la (Daŭrigo sur paĝo 4).

en 1939 dum la Kopenhaga Kongreso, baldaŭ plene aktiviĝos. Ĉiuj LEAoj, kiuj kontraktis aŭ deziras kontrakti kun SAT, nepre elektu rapide delegiton por tiu Komitato, kiu ebligos pli efikan agadon de la LEAoj.

b) apud SAT ekvekiĝas: la Sovetkomunista Frakcio (Sekretario: Kdo J. G. Leereveld, Prof. v. Reeslaan, *Blikum*, Nederlando), ĵus eldonis la unuan postmilitan numeron de „Klasbatalo”, — la Pacista Frakcio (Sekretario: Bonnin, SNC, *Metzing par Diebling*, Moselle, Francio) — la Junulara Fako (provizora Sekretario: Kdo Petro Jayer, 23 avenue Secrétan, Paris — 19). Baldaŭ stariĝos la Frakcio de la Abundanoj (Duboin k Bellami teorioj).

— La P. K. de SAT. —

Viva Lingvo Artefarita: Esperanto.

(Dua k lasta parto)

Se mi ne timus trouzi vian atenton, mi povus menciis multe da similaj faktoj, kiuj pruvas pli bone ol ĉiu ajn teoria disertado, ke, post 53-jara ekzistado, esperanto reale fariĝis viva lingvo. Konvenas tamen, ke vi eksci pri la ekzisto en ĉiuj landoj de almenaŭ unu organizo, kies celo estas diskonigi k instrui esperanton; plie, ekzistas 4 internaciaj organizoj: *Universala Esperanto Asocio*, *Internacia Esperanto-Ligo*, *Katolika Unuiĝo* k S.A.T. pri kiu mi jam parolis. La esperanta Biblioteko enhavas proksimume 5.000 volumojn. Verkoj de Dante, de Gete (Goethe) ĉ de Moljer (Molière), de Puhkin, de Ŝekspir (Shakspeare), de Strindberg, ktp. ktp. estas tradukitaj en esperanto. Mi mem tradukis *Kandid* de Volter. Pri tio mi kredas menciinda jena fakto. Kiam mi estis en Japanio, tiam oni montris al mi japanlingvan eldonon de tiu sama verko. Jen banalajol vi eble pensas. Jes, sed malpli banale estas, ke la tradukinto konfesas en sia antaŭparolo, ke la esperanta eldono tre helpis lin kompreni plurajn frazojn el la originalo...

Volter mem diris: „Unu el la plej egaj malfeliĉaĵoj en la vivo estas la multlingveco.” Se hazarde la animo de l'fama verkisto filozofa migrus en la Niponan imperion, k se ĝi povus kompreni la menciitan antaŭparolon, certe granda estus ĝia ĝojo ĉe la konstato, ke universala lingvo, artefarita k tamen viva, helpis al regatoj de l'Mikado kompreni la ironion el *Kandid*.

Prave diras italoj: *Traduttore, traditore* (tradukisto, perfidisto). Povas esti, ke mi mem iom perfidis al Volter; sed tion mi certe faris en malpli alta grado ol ĉiuj, kiuj tradukis liajn verkojn nacilingve. Rajtigas min tion diri la atesto de esperantistoj, sciantaj la francan lingvon, kiuj komparis mian tradukon kun tiuj ekzistantaj en ilia respektiva lingvo nacia. Ekzemple, profesoro „Wajsblum”, el Varsovio, skribis al mi jenon en ĉi tiu 16-paĝa letero:

„Mi konas *Kandid*-on en la originalo k en du bonegaj tradukoj (pola k germana), sed mi konfesas sincere: mi estis mirigita pro la laŭvorteco k samtempe — se oni povas diri — laŭspriteco de la esperanta traduko. La tuta subtilo k ĉarmo de l'franca prozo el la 18-a jarcento konserviĝis en nia lingvo, dum en la aliaj ili estas ĉiam nur pala rebriolo.”

Nu, ĉu do la fakto, ke la artefarita esperanto povis sukcese konkuri kun la pola k germana lingvoj ne estas plej certa pruvo, ke ĝi estas la racia solvo al la problemo pri forigo de la lingvaj baroj inter la popoloj?

Mi ankaŭ tradukis filozofian eseon de la belga profesoro Paŭlo Ĵil (Gilles): *Skizo pri filozofio de la homa digno*, k mi kredas esti fidelo transdoninta la penson de la aŭtoro.

Inter la malmultaj libroj, kiujn mi kuntrenas dum mia migrado, jen *La Sankta Biblio*, tradukita de *Zamenhof*, la aŭtoro mem de esperanto; jen *La Komunista Manifesto* en sia tria eldono; jen *La Maksimoj de La Roŝfuko* (Rochefoucauld); jen *Kontrakto de la Ligo de Nacioj* kun komparaj tekstoj en angla k franca lingvoj; jen *Al Eterna Paco de Kant*; jen *Monadologio de Leibniz*. Krome, jen japana revuo, kiu anoncas la aperon de la kvina volumo de historio pri la *Imperio de la Leviganta Suno*, kiu festas nunjare la 2.600-an datrevenon de sia stariĝo — se ne mensogas la tradicio...

Mi menciis al vi nur tradukojn, sed ekzistas ankaŭ originalaj verkoj, kvankam en malpli granda proporcio. Nun la vivo de homo ne sufiĉas por legi ĉion, kio jam aperis en esperanto, kune kun tio, kio daŭre aperas.

K, ĉar mi prenis kiel taskon prui al vi nur per faktoj la vivantecon de esperanto, mi volas bonuzi la okazon, montrante al vi ĉi tiun gravan revuon, „El Auto Argentino”, kiun hodiaŭ mem mi ricevis el Buenos Aires, k en kiu troviĝas artikolo, tradukita el esperanto k unue aperinta en la ĉina revuo *Voĉoj de Oriento*.

Estas menciinde, ke en ĉi tiu revuo troviĝas ankaŭ portreto k intervjuo je profesoro G. F. Nikolai, kiun vi sendube konas, ĉar li instruas en via Universitato. Nu, antaŭnelonge mi ricevis de tiu fama aŭtoro de *Biologio de l'Milito* leteron el kiu mi citu almenaŭ frazon, kiun mi substrekis per ruĝa krajono:

„La celojn de la esperantistoj mi konas k tut-

kore aprobas.” En alia parto de sia letero s-ro Nikolai diras, ke li scipovas legi esperanton. Se okaze la aŭtoritato de famuloj povus favore influi sur vin, mi povas menciis, ke Henriko Barbus (Barbusse), Romen Rolan (Romain Rolland), la glore fama scienculo Alberto Ajnstejn (Einstein), inter aliaj, bonvolis siavice esti honorprezidantoj de kongresoj de S.A.T. En 1926, nia organizo okazigis sian Sesan Kongreson en Leningrad k tiam eĉ la tiama popolkomisaro Lunaĉarski konsentis ankaŭ esti ties honorprezidanto.

Ĉar mi menciis la nomon Barbus, vi permesu, ke mi citu unu el liaj multaj diroj, favoraj al la lingvo universala: „*Esperanto estas la A, B, Co de la internaciismo...*”

Tiaokaze mi ne povas deteni min diri, ke se la fama verkisto parolis prave, tio signifas, ke li mem estis analfabeta internaciisto, ĉar li ne ellernis tiun lingvon. K ĉiuj anoj de la diversaj Internacioj, kiuj ne estas esperantistoj, ankaŭ estas tiurilate analfabetaj.

Se tio ne estus ekstertema, mi povus longe priparoli kritike tiun fakton k montrante ties bedaŭrindajn kousekvencojn. Mi nur diros, ke estas ĉiam preferinde atenti la farojn de homoj ol iliajn dirojn. Faktoj estas pli konvinkaj ol paroloj. *Verba movent, exempla trahunt* (paroloj emocias, ekzemploj altiras), diras latinistoj. K, rilate al la teorioj, kiuj malatentas la faktojn, mi anticipe diru, ke ili estas nur vana *jonglado* pervorta.

* * *

Esperanto estas viva lingvo. Tamen, malgraŭ ĉiuj faktaj pruvoj, kiujn oni povas kolekti, la plimulto el la lingvistoj daŭre neas la eblon stariĝi universalan lingvon. Ekzemple, en la tre serioza ĵurnalo franca „*Le Temps*” (La Tempo), n-o de la 28-a de februaro 1940, oni povis legi frontpaĝe jenon:

„Scienculoj demonstris, ke lingvo komuna al ĉiuj homoj estas ĥimero k ke la multlingveco estas nepre necesa. Ili plie demonstris, ke lingvo konsistigas per si mem propran organismon, kiu fidele spegulas la apartan karakteron de l'popolo, kiu ĝin parolas, k kiu, siaflanke, reagas laŭ decidiga maniero sur la disvolviĝon de la spirito de tiu popolo.”

Eble ne ĉio estas erara en tiu aserto. Laŭ mia propra sperto volonte mi konsentas, ke la praktikado de iu difinita lingvo povas influi sur la menson de ties praktikantoj. K tial ke ĉiuj naciaj lingvoj estas plenaj je mallogikaĵoj k ridindaj esceptoj, eble estas kelkrilate pro tio, ke la mond-historio plenas je krimoj k frenezajoj. K oni sekve povas sin demandi, ĉu la praktikado de simpla k racia lingvo, kia estas esperanto, ne havos bonan influon sur la evoluon de l'homaro?

Sed nun ne temas pri tio k mi ne volas tro paradoksumi. Mi ja nur celas konigi al vi la ĝeneralan opinionon de lingvistoj, nome, ke ĉiu lingvo konsistigas per si mem vivan organismon k sekve, ke la pretendo artefari lingvon iel similas al la provoj retorte krei vivan estaĵon.

Tiun tezon, ekzemple, defendas d-ro Alberto Doza (Dauzat) en sia verko „*La Philosophie du langage*” (Prilingva Filozofio) nove aperinta en 1927; same profesoro J. Vendries en „*Le Langage Introduction Linguistique à l'Histoire*” (La lingvo, Lingvistika Enkonduko al la Historio), eldonita en 1921. Estus superflue menciis la nomon de multaj aliaj fakuloj eminentaj, kiuj havas la saman, preskaŭ klasikan opinionon.

Ekzistas tamen kelkaj herezuloj inter la lingvistoj. Ĝi ili mi mencias nur unu, s-ron A. Meje (Meillet), kiu estis ĝis sia morto profesoro ĉe *La Franca Kolegio*. En sia libro „*Les Langues dans l'Europe Nouvelle*” (La Lingvoj en la Nova Eŭropo), eldonita en 1918, li dediĉis tutan ĉapitron al la artefaritaj lingvoj k el ĝi mi citos tre karakterizan ateston pri esperanto:

„La eblo stariĝi artefaritan lingvon, facile lerneblan, k la fakto, ke tiu lingvo estas utiligebla, estas pruvitaj per la praktiko. Vana estas ĉiu teoria diskutado: esperanto funkciis.”

K li klarige aldonas: „Lingvo estas socia institucio tradicia. La volo de l'homo senĉese intervenas en la lingvo.”

Sed mi ne volas trompi vin k do ne kaŝos, ke

ne senrezerva estas la aprobo de l'fama lingvisto. Ekzemple, li neas, ke esperanto povas havi literaturan valoron. S-ro Meje mortis antaŭ du jaroj. Nu, mi petas pardonon al lia ombro, sed mi asertas, ke li ne sufiĉe zorgis viŝis siajn okulvitrojn, kiam li kompleksis esploreme ekrigardi al esperanto. Mi ne estas poeto, nek literaturisto, k povus kontentiĝi per la atesto de la eminenta scienculo. Sed estas fakto — k tion mi persone bedaŭras — ke esperanto estas pli uzata por literaturo ol por tekniko.

Cetere, Zamenhof mem, tuj ĉe la komenco de sia elpensajo, ekrajdis Pegason k donis al ni poeziaĵojn, iom naivaj, sed emociplenaj, k kiuj baldaŭ kaptis la koron de la nunaj adeptoj de la nova lingvo. *La Vojo, Ho! mia kor* estas ankorau nun ŝate deklamataj k aŭskultataj en preskaŭ ĉiuj esperantaj grupoj. K la himno *La Espero* estas kutime kantata ĉe la komenco k fino de esperantaj kongresoj.

Mi jam diris mian bedaŭron, ke esperanto ne estas pli uzata por verkoj de scienco k *flegma* racio. Sed la demando ne koncernas miajn preferojn; temas konstati faktojn. Jen unu tute freŝdata. Jus aperis ĉi tiu 272-paĝa volumo, *Leteroj de E. Lanti* kiu konsistas el leteroj, kiujn mi skribis en diversaj partoj de l'mondo k kiujn eldonis miaj amikoj. Nu, eble netrafe, sed sen ia dubo bonintence, ili almetis, iel antaŭ-parole, relative longan poeziaĵon, kiu dediĉis al mi hungara samideano, kiam mi forlasis Eŭropon.

Pri la literatura valoro de esperanto mi mem ne havas opinionon. Sed mi povus citi multe da atestoj favoraj. Jen almenaŭ unu de homo, kiu persone ne timis komplimenti al la Muzoj en la Zamenhofa lingvo mem, S-ro Karlo Boduen (Baudoin), profesoro ĉe la Universitato de Ĝenevo (Svisio) skribis interalie jenon:

„En la diskutoj pri internacia lingvo oni ne sufiĉe atentis jenan flankon de la demando: inter la diversaj projektoj ĝi (esperanto) estas la sola lingvo literatura k per tio akiris vivon k estas vivkapabla. Esperanto realiĝis ĉi tiun lertaĵon ekvilibri la *muzikon* kun la *algebro*, la emociacan esprimkapablon kun la logikeca esprimkapablo...”

Por la personoj, kiuj volus kontroli ĉe la fonto tiun entuziasman ateston, mi aldonu, ke ĝi aperis en la revuo „*Clarté*” (Klaro), la 17-an de julio 1920. Tiun gazeton eldonis tiutempe Henriko Barbus en Paris.

La fakto, ke esperanto estis ĝis nun pli uzata por literaturo ol por scienco k tekniko estas, mia opinio, klarigebla per tio, ke ĝenerale la esperantistoj estas idealistoj, homoj, kiuj revas pri homaro pli bonstata ol la nuntempa, pri senmilita mondo, en kiu regus interfrateco. Mi konfesas, ke tia celo estas vere tre malaktuala; k eble tio klarigas, kial la mondlingva movado ne progresas proporcie al la fervoro de ties adeptoj.

* * *

Mi konjektas, ke inter la afabla aŭskultantaro estas kelkaj personoj, kiuj preferus aŭdi, ĉu esperanto estas facile lernebla. Al tiu demando mi respondas: jes k ne. Jes, se temas nur akiri la kapablon legi k komprenigi sin; ne, se oni celas eltrovi la kaŝitajn trezorojn, kiujn ĝi entenas. Por funde koni esperanton, necesus esti tute forĝesinta sian gepatran lingvon; necesas, plie posedi laŭ tre alta grado logikecan, raciecan pensmanieron. Neniu nuntempe scipovas senmanke la artefaritan lingvon. Ties aŭtoro mem ne sukcesis tute senigi sin je la influo de naciaj idiomoj dum la praktikado de sia propra elpensajo.

Sed kredeble mi nun emas paradoksumi. Kiu lernas nacian lingvon, tiu ne celas ĝin uzadi pli bone ol ties klasikuloj. Sufiĉas scii legi iliajn verkojn k ĉefe esti kapabla komprenigi sin ĉe hotelo aŭ restoracio, se oni troviĝas en la koncerna lando. Por akiri tian scion de esperanto, oni bezonas dudekfoje malpli da tempo.

Antaŭ proksimume dek kvin jaroj, mi legis, ke s-ro Bode (Baudet), tiam prezidanto de la Paris-a Komerca ĉambro, metis en sian poŝon esperantan gramatikon kun vortareto, kiam li ekveturis al Italio, por ĉeesti, en Milan, konferencon, organizitan kun la titolo *Esperanto k Komerco*. Dum la vojaĝo s-ro Bode dediĉis sian tutan tempon al l'lernado, k du tagojn poste li

povis legi raportojn k kompreni preskaŭ ĉion el la esperantaj paroladoj. Mi ne scias, ĉu tio estas vere. Je tia „heroaĵo” mi mem ne estus kapabla. Sed mian nekaptablon pri lingvolernado mi jam konfesis al vi. K malgraŭ tio, estas *fakto*, ke mi tamen sukcesis akiri pli perfektan scion de esperanto ol de mia gepatra lingvo. Ne miru vi! Prefere aŭskultu la opinion de la jam menciita lingvisto, A. Meje pri tiu naciaĵo:

„La uzado de la franca lingvo fare de duonklerulo ridetigas preskaŭ ĉe ĉiu frazo tiujn, kiuj, dank’ al sia ĝenerala kulturo k al la lernado, kiun ili faris pri la ekzakta signifo de l’ vortoj, scipovas sian lingvon... *Necesas ne konscii pri malfacilaĵoj por konsenti sen timtremo skribi kelkajn liniojn en franca lingvo.*”

K tion diris tiu eminenta fakulo rilate al la francoj mem! Kiom da tempo devas do dediĉi alilandulo, por funde scipovi la lingvon de Volter k Anatol’ Frans (France)? K la samon oni povas diri pri ĉiuj aliaj lingvoj naciaj.

Ĉar intence mi limigas min je faktoj, jen unu tre freŝdata. Ĝi troviĝas en letero skribita en Buenos Aires, la 16-an de ĉi tiu monato. Ties subskribinto estas juna komizo. Aŭskultu lian konfeson:

„Kion mi scias, tion mi mem lernis; mi ja vizitis lernejon nur ĝis la tria klaso k en provinco, kie instruistino ĝenerale ne estas tre kleraj. Poste mi devis helpi miajn gepatrojn k nur tre malofte havis la okazon ĉeesti specialajn kursojn. La hispanan lingvon mi malbone skribas k parolas; se lastatempe mi iomete kleriĝis, estas dank’ al esperanto. Lernante ĝin, mi ja ankaŭ lernas la nacian lingvon.”

Ĉu do ne kuŝas en tiu konfeso de simpla homo plej bona pruvo pri la facila lernebleco de esperanto? K ĉu ne estas ankaŭ tre notinda la fakto, ke esperanto helpas lin lerni sian gepatran lingvon? Longan komenton mi povus fari pri tiu lasta punkto, se tio ne estus ekster la kadro per kiu mi limigis min. K se iu inter la aŭdantaro havus la plej etan dubon pri la aŭtentiko de ĉi tiu dokumento, li povas sin turni al mia korespondanto, *Johano Sabate, Gazcon 1454, Buenos Aires.*

Tiaj faktoj estas grandnombraj. En Francio pluraj laboristoj faris al mi similan konfeson; k mi povis rimarki, ke ili uzis esperanton pli korekte ol la francan lingvon.

Sin bazante sur tiaj k similaj faktoj, oni rajtas aserti, ke se la lernado de fremdaj lingvoj estus ĉie anstataŭata per tiu de esperanto, rezultus de tio grandega ŝparo da tempo k energio k tre profitus la homa interkompreniĝo.

Kial do tia simpla k racia solvo ne ankoraŭ ĵin trudis? Mi ne estus embarasata, por respondi ĵin demandon, sed tio postulus relative longan priparoladon k ĝi estas ekster mia temo. Mi ja celis nur pruvi, ke esperanto estas viva lingvo, k mi kredas esti farinta tion pli malpli konvinke ...

* * *

K nun ne demandu min, ĉu mi kredas je la definitiva sukceso de mia kara lingvo. Por mi, persone, ĝi jam venkis, ĉar de kvar jaroj mi rilatas nur kun esperantistoj. Per esperanto mi akiris geamikojn, ĉie, kien mia migremo puŝis min. Se mi ne timus paroli tro paradokse, mi konfesus mian nemaloftan nedeziemon, ke ĉiuj homoj parolu esperanton. Ial mi ja preferas, ke la esperantista popolo, dislokita tra la tuta mondo, konsistu ĉefe el idealistoj, similaj al mi, kiu tre ofte havas la senton esti naskiĝinta tro frue en tro malnova mondo ...

Mi eĉ konfesos al vi, ke en ĉi tiu milita tempo mi preskaŭ bedaŭras esti esperantisto. Mi havas geamikojn en Danio, Norvegio, Britio, Germanio, Italio, Japanio ktp. — eĉ en Francio! ... Se mi ne estus lerninta la artefaritan lingvon, estas tre verŝajne, ke da ili mi havus nur en ĉi tiu lasta lando, kie mi hazarde naskiĝis k edukiĝis, k sekve timus k kompatus nur pri francoj. Tio verŝajne ŝajnas al vi nekredebla, nekomprenibla, sed estas nur iaj provincoj de mia patrio *Esperantio.*

Se troviĝas inter vi idealistoj — k pri tio mi ne volas dubi — kiuj deziras akiri la esperantan civitancon, tiuj eksciuj do, ke oni povas lerni esperanton eĉ sen la helpo de instruisto. Mi mem lernis ĝin ĉe la fronto dum la milito el 1914—18 — kiu devis esti la lasta ... Kiam mi estis mobilizita, tiam mi lernis en mia doisoro lernolibron k vortaron, k ĉirkaŭ la fino de 1915 mi jam povis korespondi en esperanto.

Tiu lingvo havas vere mirindan eĉon: du homoj, loĝantaj antipode unu de la alia, kiuj lernis ĝin nur per libroj, povas tamen interkompreniĝi, se hazarde ili renkontas unu la alian. Ĉar mi alprenis kiel metodon argumenti nur per mencio de faktoj, mi finos, konigante al vi unu, kiun vi povos tuj kontroli. Mi ekvidas inter la aŭskultantoj iun, kiu ne komprenas mian nunan paroladon, nome s-ron Garcia. Ĝis antaŭ ses monatoj, tiu junulo neniam havis la okazon paroli en esperanto kun fremdulo. Nul kiam mi venis en Santiagon k renkontis lin, tiam ni tuj povis interkompreniĝi.

Estimataj aŭskultantoj, bonvolu permesi, ke mi traduku mian diron al s-ro Garcia, k poste li mem povos atesti, ĉu mi diris aŭ ne la veron.

(S-ro Garcia ekstaris k hispanlingve konfirmis la diron).

Gesinjoroj! mi preterlasis fari historian skizon pri la multaj artefaritaj lingvoj. Tio tamen estus al mi tasko tre facila, k mi povus senpene alpreni sintenon de erudiciulo. Mi volis limigi min nur je la mencio de esperanto, tial ke ĝi fakte estas la sola, kiu sukcesis fariĝi viva. Mi menciuj tamen Volapukon, kiu vivetis dum kelkaj jaroj k mortis en 1884, tial ke la sperto montris, ke ĝi ne estis tute taŭga. Male, evidentiĝis, ke esperanto perfekte solvas la problemon pri tutmonda interkompreniĝo. Ĉiuj lingvaj projektoj, kiuj naskiĝis post esperanto, restis nur ... projektoj. Oni ne malkovras dufoje Amerikon ...

Konvenus, ke mi priparoletu la strukturon de la lingvo elpensita de d-ro Zamenhof el Polio. Tion mi tamen ne faros, tial ke mi ne devas trolongigi mian paroladon, k precipe tial ke tia priparolo iel ŝajnas al mi superflua. Se inter vi kelkaj personoj konvinkiĝis pri la utilo de universala lingvo, tiuj havas kiel devon lerni esperanton. Tion farante, ili mem konstatos ties simplon, regulecon, logikecon k senliman kapablon je termina pliriĉiĝo.

Kiel mi diris al vi komence, jam de 4 jaroj mi estas for el Francio, k la lingvo de la lando, kie mi naskiĝis, preskaŭ fariĝis fremda al mi. K-ĉu tio estas konfesinda? — uzante nun nacian lingvon, mi ŝpartas senton, kvazaŭ mi pekas; mi kredas aŭdi riproĉojn de la anoj el mia regno ideala Esperantio.

Tamen la franca lingvo ludis dum longa tempo le ĉefan rolon en la internaciaj rilatoj, ĉefe sur la diplomatia kampo. Sed forpasis tiu lingva hegemonio. Ĉe la Ligo de Nacioj, en Genev, kaŝa lukto okazis inter la angla k franca lingvoj. K el tio oni povas konkludi, ke neniu nacia lingvo povas esti akceptata kiel internacia — krom se la brit-usona imperialismo konkerus definitive la tutan mondon ...

Restas al mi nur danki vin pro via atento kompleza. Estu tamen aldonite, ke mi estas preta respondi al la demandoj, kiujn eventuale vi dezirus fari.

E. LANTI.

(Universitato de Ĉilio, Santiago, 29-4-1940).

Voĉo el Centro de Eŭropo

Denove aperis nia tutmonda SAT gazeto, kiun ni ame akceptis k scivoleme legis ... La ĝojo trapenetris nin, ĉar ni vidis, ke ni havas denove en la tuta mondo, multe da kunbatalantoj, por nia komuna celo. Tio plifortigis nian kuraĝon. Ni volas esti indaj plenumi nian vivrolon. Ni ne restos malantaŭe, ni okupos la ĝustan lokon en la vicoj de nia komuna celado ... Ni informas la legantaron, ke la interna stato de nia lando ne multe favoras nian ideon, sed tio ne povas timigi nin ... Nun ni vivas en lando liberigita ... En ĝi la entuziasmo por rekreado estas forta, k ankaŭ plifortigis la emo kunligi ĉiujn slavajn naciojn. La devizo, „kunligi ĉiujn slavajn naciojn,” estas subtenata de iuj politikaj partioj k helpe de gazetaro estas prilaboritaj la amasoj tiel, ke tiu ĉi devizo fariĝis vere populara k regas la direkton de la ĝenerala opinio tiel, ke ĝi devas esti respektata, kiel spontana forto ... La malkonfido al okcidento k la danĝero el denove kreskanta germana naciismo, ankaŭ la amo de nia popolo al rusa ruĝa armeo, ĉio puŝigas niajn landanojn, orientiĝi — orienten. Konsiderinte la spontanecan forton kreatan de ĝenerala opinio, vi komprenos, ke ni Esperantistoj ĉi landaj, vere malfacile trabatalas la vojon!

Sed ni neniam cedos en nia marŝado, ĉar ni estas konvinkitaj, ke la ideo pro kiu ni vivas k batalas estas ĝusta k ke niaj penadoj ne restos senutilaj. Ni fieras pro tio, ke ni estas portantoj de novaj ideoj, kiuj celas kunfratigi la naciojn ... Por ni ĉekoslovakoj ne sufiĉas nur interfratiĝo kun aliaj slavaj nacioj; en tiu ĉi ago ni vidas nur la unuan ŝtupon de fondiĝa evoluo de la homaro — Ni en niaj imagoj iros pluen k la interfratiĝo de la tuta homaro estas nia ĉefcelo. Ĉiuj kiuj samcelas, enviciĝu, k ni estos vera potenco apogata de pacamantoj ĉiulandaj. Ni firme kredas, ke ni per kunigitaj fortoj venkos.

— Josefo Patera —

(daŭrigo de paĝo 2)

venon de bombo-aviadiloj. Ni kuras al la primitiva tranĉejo, kiu eĉ ne povas rezisti malpezan brulbombeton. Ni ja ne estas germanoj, nur damnitaj fremdlandanoj. Kiel talpoj ni rampas sub la teron. La nokta ĉielo lumiĝas pro la fosforo. La signo de atako. La zumado de la aviadilaj motoroj k la pafado de la kontraŭ aviadila artilerio nervigas la bestojn k homojn. La tuta tero tremas pro la eksplozivaj bomboj. Ni retenas la spiron atendante la tujan morton. La minutoj limakrapide forpasas. Finfine sonas la malalarmiga signalo. Lu tuta urbo estas en flamoj. Centope kuŝas la kadavroj de infanoj, inoj junaj k maljunaj, de homoj diversnaciaj. Spite al ĉiu mizero me sentas min kvazaŭ indulgita, ĉar mi ankoraŭ vivas. K mi ne scias, ĉu tio, kiom mi nun travivas, estas reala aŭ la sonĝo, spertita antaŭ kelkaj horoj.

— Gerrit Kalkman —



Neĝulino

Jen unu el la ĉarmaj desegnoj per kiuj nia k-do A. Langeberg ilustris la valoran libron „NEGŬLINO KAJ ALIAJ FABELOJ” de Fratoj Grimm.

Ĉu vi jam posedas ĉi tiun klasikan tradukon de KABE? Ni denove povas liveri ĝin!

Riĉe ilustrita; 94 paĝoj; kartonita.

Prezo fr.fr. 80.— (1,75 gld.). Mendu tuj ĉe SAT, PARIZO aŭ ĉe C. v. Essen, Floretstraat 10, ROTTERDAM-Z. Nederlandanoj mendu nur ĉe FLE!

La evoluo de la Teksindustrio.

La tri plej gravaj branĉoj de la teksindustrio nuntempa produktas katunajn, lanajn k sinteze faritajn ŝtofojn: la artefaritan silkon k la t.n. ĉellanon. Oni povas konsideri la artan silkon la konkuranto de la katuno, la ĉellanon kiel hemian anstataŭanton de la natura lano. Ambaŭ sintezaj ŝtofoj konkeris en la daŭro de la dudeka jarcento grandan vendosferon; en la lasta jaro antaŭ la dua mondmilito la produktado de arta silko k ĉellano estis pli ol 10% el la tuto, produktita de la teksindustrio. Precipe post la eltrovo de la t.n. „viscose“-procedo, kiu uzas picean lignon kiel krudmaterialon por la arta silko, la produktado de tiu ŝtofo rapide progresis en preskaŭ ĉiuj industri-ŝtatoj. Sed la artefaritan lanon oni faris ĉefe en tiuj landoj, kiuj mem ne disponas pri sufiĉe da natura lano k kiuj celas ekonomie liberigi sin de la eksterlando. Fabele rapide la artsilka industrio fariĝis unu el la plej grava de la tuta mondo. En 1913 ĝi produktis nur 11000 tunojn; tio estas malpli ol 0,1% de la tuta teksindustrio. En 1939 oni faris jam 540.000 tunojn!

Ankoraŭ pli rapida estis la kresko de la artefarita lano: antaŭ 1932 oni entute produktis nur 5000 tunojn, k la produktado en 1939 atingis jam la kvanton de 480.000 tunoj.

La plej gravaj produktantoj de sintezaj ŝtofoj estis (1939):

	ARTEFARITA SILKO	ARTEFARITA LANO
USONO	150.000 tunoj	24.000 tunoj.
JAPANIO	108.000 „	140.000 „
GERMANIO	65.000 „	155.000 „
ITALIO	54.000 „	87.000 „
ANGLO	54.000 „	27.000 „

Per tiuj ciferoj oni do povas konstati, ke Usono k Anglio kune produktis tiom da artefarita silko kiom Germanio, Italio k Japanio, sed ke lastnomita aŭtarkiema trio prenis sur sin 90% de la produktita ĉel-lano.

La pli malnovaj branĉoj de la teksindustrio en Eŭropo k Usono donas bildon regresan. Tio validas precipe por la katun-industrio, kiu perdis grandparte sian ekster-eŭropan merkaton, dum Eŭropo mem en 1938 uzis proksimume 17% malpli da katunaĵoj ol en 1913. Konforme al tio malkreskis dum nomita jarcento la katunproduktado en Eŭropo k Usono per preskaŭ 17%. Kontraŭe al tio ni konstatastas ekster Eŭropo dum la sama periodo fortan kreskon: en Sud-Ameriko ĝi estas 90%; en Azio eĉ 115%.

La brita teksindustrio estis jam antaŭ unu jarcento eksportindustrio. En 1814 la duono el la tuta eksporto de John Bull konsistis el katunaj ŝtofoj k fadenoj. Sed la problemo de la krudaj materialoj kaŭzis zorgojn al la Britoj. Ĝis la sklava milito ili dependis je 90% de Misisipi. Post 1865, kiam la Nordanoj estis venkintaj k energie komencis fondi propran teksindustrion, la Angloj koloniis Afrikon k konstruis siajn akvobarojn ĉe Nilo, tiel ke Egiptio povis planti la kotonon sur

areo de 750.000 hektaroj. Krome Sudano k Uganda liveris al Manĉestro 100.000 tunojn. Aldonu al tio pli ol milionon da tunoj, kiujn produktas Brita Hindio, k vi komprenos, ke la britaj zorgoj pri krudaj materialoj ĉirkaŭ 1913 tute malaperis.

Post la unua mondmilito ankaŭ Sovetio pligrandigis sian koton-kulturon. En 1937 ĝi eksportis preskaŭ 40.000 tunojn.

Kiam post la unua mondmilito la industrio komencis lokalizi sin novaj zorgoj aperis por la eŭropaj fabrik-ŝtatoj, kiuj eksportis katunaĵojn, ĉar oni fondis fabrikojn tie, kie la laboristoj plej malmulte perlaboras k kie entute la produktadkostoj estas plej malaltaj. Estis profite konstrui fabrikojn en la proksimo de la konsumantoj. Tio signifis por Azio, kun ĝia granda kotonkulturo k ĝiaj 1000 milionoj da loĝantoj, la rapidan kreskon de propra mehanika teks-industrio, kiu en malmulte da tempo forkonkurencis la multekostajn eŭropajn import-artiklojn. En 1913 la britaj Hindoj aĉetis ankoraŭ 2571 milionojn da kvadrataj metroj da anglaj katunaĵoj, en 1938 ili deziris nur 245 milionojn. La tekslaboristoj en Bombej perlaboras 60 ĝis 70 cendoj tage. Se ili produktus nur duonon aŭ trionon de tio, kion produktas iliaj anglaj kolegoj, eĉ tiukaze Bombej k Madras produktus pli malkare ol Oldham k Manĉestro.

Tamen koncerne ekspluatadon en la malbona senco de l' vorto Japanio superas britan Hindion. Tie la teksistoj perlaboras ankoraŭ malpli k krom tio oni establis tie grandentreprenejojn kun perfekte raciigita ekspluat-sistemo. Kulminas tie la teknika povo ĉe senbrida ekspluatemo kiel en Eŭropo antaŭ la fondiĝo de la laborista movado. En Osaka, Kobe k Nagoja la laboristaro de la katunfabrikoj grandparte konsistas el virinoj k knabinoj, fivarbitaj de centoj da agentoj per monpruntoj al malriĉaj terkulturistoj, kiuj dronas en ŝuldojn. Kiom longe la prunto ne estas repagita tiom longe la knabino restas en la fabriko, kiu havas grandan dormdomon por la internaj laboristoj. La salajroj ĉe la ŝpinado estas 44 cendoj por la virinoj k 95 cendoj por la viroj (tage); en la teksejoj oni pagas 39 cendojn al la virinoj k 68 cendojn al la viroj. Ekzistas du-grupa sistemo. Ĉiu grupo laboras 12 horojn. La maŝinoj neniam haltas. La ekspluatistoj ne okupas sin pri semajna ripoztago (ankaŭ ne en brita Hindio); ĉiumonate la laboristoj ĝuas du liberajn tagojn. Krome ili liberas dum la novjara tago k dum unu tago en la somero.

Estas do kompreneble, ke la japanaj teksaĵoj forkonkurencis la eŭropajn ankaŭ pro tio, ke la japana registaro, donante subvencion al la navigaciaj societoj, devigas tiujn teni la frajt-prezojn malaltaj. Tamen unurilate la pozicio de Japanio ne estis forta: la kotonon ĝi devis importi el Ameriko k Hindio. Ankaŭ en Ĉinio la kotonkulturo estas grava k ni povas esti certaj, ke estonte Ĉinio ludos grandan rolon en tiu industria branĉo.

K tiel la vendosferoj por la malnova k dividita Eŭropo daŭre pli malgrandiĝas, ĉar la mehanika industrio estas konkerranta la tutan mondon. K tio signifas la finon de la kapitalisma ekonomio, almenaŭ ... se oni ne trovos alian planedon por akiri novajn vendosferojn sen propra industrio.

Kompilis B.W.

VOKO PRI UNUECO!

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946-a

1° esjrimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu la eventualan reunuiĝon de la neutrala internacia Esperanto-Movado:

2° esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita Universala Kongreso;

3° instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Asociojn, neŭtralajn aŭ ne-neŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instanco kiu reprezentus ĉiujn esperantistojn senescepte;

4° decidis komuniki tiujn deziresprimojn al la Esperanto-gazetaro por ke ili veku ĝeneralan atenton kaj simpatian kaj pritraktis plu la tagordon.

Kun Esperantaj salutoj
nome de la estraro

D.ro T. van Gindertaelen, prez.
Leopoldstraat 95-E, MECHELEN
(Belg.)

El leteroj de germanaj Kdoj

..... Dro Ziegler, SATano, gvidas la movadon tutbavarian, k tre influhava li estas ĉe la registaroj urba k landa. Li aranĝis kurson por instruistoj popollernejaj, ĉar aŭtune esperanto estos fako en la instruprograme de la lernejoj Munhenaj. Dro Jozef Schmalzl parolis dum aprilo, en la Munhena Universitato.

Ĉeestis reprezentantoj de la urbo, universitato, UNRRA, Universitato k ŝtataj administracioj. Partoprenis multaj Usonaj esperantistoj, k Usona oficio paroletis esperantlingve. 20 kursoj en la urbo.

..... En Hamburgo la societo restariĝis; bone progresadas malgraŭ la cirkonstancoj. Kelkaj SATanoj rekontaktiĝis.

..... En Augsburgujo ĵus fondiĝis „Esperanto-Grupo-Laboro“: 60 anoj. — La faŝista polico konfiskis k detruis la tutan materialon k arkivon de la tiea grupo, escepte la standardo, kiu migris kaŝe tra Svisio al Londono en 1933!

La Naciismo venenas ankoraŭ la mondon.

Trarigardante la naciajn literaturojn, ni trovas en ĉiuj epokoj k en ĉiuj lingvoj la saman laŭd-kanton al la mirindaj kvalitoj de la propra nacio. Multe glorataj estas la faroj de naciaj herooj, noblaj patriotoj, sinoferemaj defendantoj de tiu sankta „io“, kiun oni nomas patrolando. Ni akiras la konvinkon, ke tra la historio pli forte forĝas unu al la alia la komuna lingvo, la komunaj tradicio, k kutimoj, la komuna nesto, ol la klasa egaleco de homoj penantaj, laŭ sama maniero, laŭ sama vivoritmo por akiro de l' ĉiutaga pano. Tial, malgraŭ la ekzisto de Sindikataj k Partiaj Internacioj el Laboristoj, kun multmiliono anaro, povis eksplodi la milito en septembro 1939, kiel siatempe tiu en aŭgusto 1914. Ekspluatantojn k ekspluatantojn metis en unuecan fronton la denaska komun-sento rilate teron, edukon, morojn k precipe... lingvon.

Ne diru, ke militoj devas eksplodi, ĉar la kapitalismo volas tion! Socialismo ja havas rimedojn por malhelpi al la kapitalismo realigi siajn malbonajn intencojn. Se la tutmondaj socialistoj vere sukcesus stariĝi unuecon ne nur laŭnoman, laŭliteran, sed realan, efektivan, sin bazantan sur personaj spertoj k interrilatoj (helpe de komuna mondlingvo!), ni vidus rapide malfortiĝanta la pozicion de l'magnatoj.

Ĉar ja ne nur ekonomia estas la potenco de l'reganta klaso, sed ankaŭ spirite okazas la perforto, laŭ la konata sentenco: *dividu por regi*. La malpacigo de l'spiritoj estas unu el la plej fortaj apogiloj de kasto, kiu mem ne konas la skrupulojn de tradiciaj, religiaj, naciecaj antaŭjuĝoj, sed kiun gvidas nur la kruda avido akumuli pli k pli da riĉaĵoj. Ĉar per mono ja estas akirebla ĉio, eĉ servema gazetaro k intelektaj lakeoj inter artistoj k sciencistoj.

Precipe forta estas la tradicio de popolo, transdonita al la nun vivanta generacio de la pli fruaj — en la pratempoj buŝe, poste skribe — depost la invento de Gutenberg per la presita vorto. La naciaj lingvoj, mem formiĝintaj el la amaso da tradicio akumulita tra la jarcentoj, portas la literaturan heredaĵon de epoko al epoko. Kaj, se vi trafolumas la legolibrojn, unualinie tiujn difinitajn al la lernanta junularo, vi vidas kiel estas flegata k bredata la nacieca spirito. Ĉe la etuloj oni komencas, k la iom pli aĝaj estas superŝutataj per herolegendoj glorantaj murdon, ŝtelon k perfidon.

Almenaŭ estas tie ĝis nun. Ĉu restos tiel, jen alia demando. Ŝanĝon alkonduki estos la tasko de la laborista klaso; ĝi sola ŝajnas al ni interesita pri funda ŝanĝo de la nuna reakcieca stato; ĝi sola kapablos efektiviĝi tiun ŝanĝon, tiun revolucion en la spirito.

Sed se la proletaro sekvos laŭ la inter-nacieca vojo, kiu allasas grandanime la ekzistadon de nacioj k nacioj kun ĉies apartaĵoj k proprecoj, tiam la ŝancoj je fundamenta ŝanĝo ne estas konsiderindaj. Nur se la homoj, kiuj alsopiras daŭran pacon, konsentos pri radikalaj ŝanĝoj en sia tuta spirita sinteno, ili povos esperi elsaviĝon el la haoso.

Por tio ili ankaŭ devos rezigni la idoligon de nacia lingvo k fortadecide akcepti la ideon pri sennacieca lingvo. Esperanto ekzistas; ĝi servis jam multe, ĝi pruvis sian taŭgecon. Ni do certigu al ĝi la lokon en la homa socio de l'morgaŭo, kiun ĝi meritas okupi.

— N. Bartelmes —

En ĉiu E-klubo funkciu
S.A.T.-peranto!

LISTO DE NIAJ ĈEFAJ PERANTOJ K TABELO DE LA KOTIZOJ POR 1946

- Alĝerio: Kdo Noël BARBRY, 110 Boul. Bru, Alger 100 fr.fr.
- Argentino: Kdo José Maria DURAN, Casilla Correo 1802, Buenos Aires 8 pes.
- Aŭstralio: Kino Anna C. HINTZE, 17 Myfield, St Coburg N 13, Victoria 5 ŝil.
- Aŭstrio: Kdo Ludwig SAGER, Maderspergerstrat 14, Wien-XVI (?)
- Belgio: Kdo BASTEELS G., 190 rue de Monténégro, Fores-Bruxelles 40 fr. belg.
- Brazilio: Kdo Roberto das NEVES, ĉe Esperanto-Klubo, str. Araujo Porto Alegre 36, Rio de Janeiro 50 Kruz.
- Britio: Kdo O. MELTON, 19 Brentwood Grove, Great Barv., Birmingham-22-a 5 ŝil.
- Bulgario: Pantelej Stojanov ĝumakov; str. Morava 89. Sofio ?
- Ĉekoslovakio: Kdo Josefo PATERA, Dvorkova 24, Pilzen 60 kr.ĉ.
- Ĉilio: vakas —
- Danio: Kdo R. JORGENSEN, J. P. Jacobsensvej 59, Aabyhoj 7,75 k.d.
- Finnlando: Kdo Joel VILKKI, Somero ĉ?š
- Francio: ĉe S.A.T., 67 av. Gambetta, Paris-20 (poŝta konto No 1234-22-Paris) 10 fr.fr.
- Germanio: por tuta Germanio: Kdo Ludwig PUFF, Am Ebelfeld 249, Frankfurt-a/M.-Praunheim (6?)
aparte por la brita zono: Kdo E. SCHMIDT, Hirtenstr. 6, Rortmund (21-a)
aparte por la usona zono: Kdo Hermann WAGNER, Im Himmelsberg 10, bei Präsident Neuffer, Stuttgart (14)
aparte por la franca zono: Kdo Julius MATHE, Sternwaldstr. 5, Freiburg i./Breisgau (17-a)
- Hungario: Kdo Bela BLEIER, Hargita-utca 10, Pestszentlőrincz (?)
- Italio: ne ankoraŭ difinita; ni rilatas kun fluraj Kaoj —
- Japanio: vakas —
- Meksiko: Kdo Francisko AZORIN, Guadaluquivir 41. E. Col. Cuanhtemoc, Meksiko D.F. (°)
- Nederlando: Kdo Bas WELS, 1e Wandeloordwstr. 33, Rotterdam 2,50 gld.
por monaferoj: C. v. Essen, Floretstr. 10, R.dam-z.
- Norvegio: Kdo Jorgen ROSENDHAL, Uelandsgata 63, Oslo-38.
- Nov-Zelando: vakas —
- Palestino: ne ankoraŭ difinita, — ni rilatas kun pluraj Kdoj —
- Polio: Kdo Albin PIOTROWSKI, Jasna 8, Krakow (?)
- Portugalio: Kdo João Frazao de FARIA, Rua José Estevao No. 26, 3° E. 50 esk.
- Sud-Afriko: Kdo David DAMBE, P.O. Box 2418, Johannesburg 5 ŝil.
- Svedio: Kdo Justo BOBERG, Palmfeltsvägen 49, Enskede 5 Kr.
(poŝtĝirokonto No. 3815)
- Svisio: Kdo Auguste BAVAUD, Charmille 30, Genève (°)
- Usono: Kino Myrthe R. DOUGLAS, P.O. Box 6475, Metro St. Los Angeles 55, Calif 1,25 \$

Rimarkoj:

- pri la landoj markitaj per la signo (?) = pro la malstabilo de la tiea valuto, k absoluta nescio pri la aĉetpovo de la meza salajro, ni ne kapablas fiksi la kotizon; ni fidis al niaj perantoj por ĝin bonjuĝe ciferi. —
- pri la landoj markitaj per la signo (°) = ni publikigos la sumon de la kotizo en la proksima numero.

Helpe al nia Asocio

De la jenaj k.doj ni ricevis monon por helpi nian asocion tra tiu ĉi ankoraŭ nenormala tempo.

— K.do Dejardin, Paris, 15 f.f.; K.do Lebacqz J. Anderlecht, 25 f.b. K.do Marso, Parizo, 58 f.f.; K.do Chabrière, Parizo 12 f.f.; K.do Merigot, Bagnolet, 50 f.f.; K.do Blanc, Champs, 100 f.f.; K.do Suz. Benoit, 40 f.f.; K.do Langé, Puteaux, 25 f.f.; Gek.doj Dazun Parizo 200 f.f. K.do L. v. M. Hago 2.50 gld. K.do v. d. B. Deventer 0,40 gld. K.do H.A.B. Bussum 10 gld. A. v. d. H. Bussum 2.50 gld. P. K. Deventer 0,80 gld.

Ni tutkore dankas ĉiujn.

KORESPONDADO

Korespondu kun pli ol unu lando; la individua kontakto inter la esp-istoj estas eksterordinare grava. Praktiku la lingvon k ekkonu la mondon pere de Esperanto.

DEZIRAS korespondi:

— K.do Todor Kerdjiev, str. Pliska 117, RUSE, Bulgario. Li deziras kontakton kun ĉiuj landoj.

— K.do L. Ninaber, Borneostr. 29, DELFT, Nederlando.

— *Kino-Amatoro* 8 m/mserĉas korespondantojn por interŝanĝi konsilojn k eventuale filmojn. K.do Dessoit; 44 rue Chaligny, PARIS XII, Francio.

— LAB. ESP. GRUPO, ENSCHEDE, Nederlando, v. Coeverdenstr. 39, festos en Aŭgusto tridekjaran ekziston. Sendu leterojn aŭ bildkartojn. Ni nepre respondos!

— K.do Jozef Kozibradek, Dobrovsského 530, Plezenec, Ĉeĥoslovakio.

— Radomir P. Klajjić, Str. Svetog Save 23, BEOGRAD, Jugoslavio.

— Geedzoj F. v. d. Goorberg, Qaurulus v. Uffortstr. 58, NOORDWIJK aan Zee, Nederland.

Legu nepre esperanto-originalaĵojn de originala homo!

VERKOJ DE K.DO LANTI

Vortoj de K.do Lanti . . .	192 paĝoj fr.fr. 60; 1 gld.
Leteroj de E. Lanti . . .	280 paĝoj fr.fr. 100; 2 gld.
NACIISMO	124 paĝoj fr.fr. 40; 0,75 gld.
For la Neŭtralismon . . .	32 paĝoj fr.fr. 10; 0,25 gld.

Mendu ĉe S.A.T. en Parizo aŭ ĉe k.do C. v. Essen en Roterdamo.

Ĉu vi jam posedas la librojn de la roman-serioj?

Kaptu la okazon: La libroj estas ridinde malmultekostaj, ĉar validas ankoraŭ la antaŭmilitaj prezoj. Mendu ĉe S.A.T. Nederlandanoj mendu ĉe F.L.E.